
# FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

STIFTUNG BSW

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 1 | Januaro/Marto 2011




Warmbrammentransport - transporto de ardaj ŝtalblokoj   Foto Sammlung Stöters

# El la lando de ĉijara IFEF-kongreso

Certe vi jam estas informitaj pri la 63-a kongreso de IFEF, kiu okazos de la 7-a gis 14-a de majo 2011 en la nordĉeha regiona urbo *Liberec* kaj pri la postkongreso, okazonta de la 14-a gis la 18-a de majo 2011 en *Praha*. Ni donas al vi pli detalajn informojn ne nur pri la vizitotaj vidindajoj lau programo de la kongresaj arangoj, sed ankau pri aliaj, kiujn vi povas viziti ekster programo dum via libera tempo.


## *Pendolino*

**komencis sesan jaron de ekspluatado**

Preskaŭ ses milionojn da pasaĝeroj jam transportis komfortaj vagonoj en trajnoj *SC Pendolino*, en pli ol kvinjara ekspluatado. Ekde la jaro 2011 oni enkondukis kelkajn novaĵojn.

Veturtempo el *Praha* al *Ostrava-Svinov* laŭ nova horaro daŭras 2 horojn kaj 56 minutojn, el *Praha* al *Brno* 2 horojn kaj 23 minutojn. En junio 2009 ektrafikis vendreda trajno *SC Pendolino Sprinter* por kunligi ankaŭ *Praha* kun *Třinec*, kaj tiun ĉi distancon la trajno nun traveturas en 3 horoj kaj 55 minutoj. Ĉeĥaj Fervojoj (*ČD*) entute ekspluatas 7 kombinaĵojn *Pendolino* je trajnkursoj *Praha – Ostrava – Třinec* kaj *Praha – Brno – Bratislava*. Sur ĉeĥaj trakoj ĝis fino de 2010 trajnkompletoj *Pendolino* traveturis jam pli ol 11 milionojn da kilometroj. En unua klaso de la trajnoj *SC Pendolino* personaro senpage proponas al pasaĝeroj tagĵurnalojn kaj refreŝigaĵon, ekde januaro 2011 kompletigita pri vegetarana manĝaĵo. Nove oni en bufedvagonoj priservas klientojn donante al ili trinkaĵojn kaj manĝaĵojn sur porcelano. Ekde januaro 2011 oni krome ĉiusemajne ŝanĝas menuon kun proponataj bagetoj (blanka bakaĵo), sandviĉoj, salatoj kaj desertoj, kaj krome la klientoj povas mendi ankaŭ konvenan manĝon por diabetmalsanuloj. Liveranto de rabata refreŝigaĵo estas kompanio *BAPA*, elirinta el orda konkurstraktado. Disportadon kaj priservon en la trajno daŭre prizorgas kompanio *JLV* (Restoraci- kaj Lit-vagonoj)

(prilaboris Jindřich Tomíšek,
reviziis Heinz Hoffmann)





Welfenschloss in Herzberg Foto: Herzberg – die Esperantostadt

# 2012
# Internationaler Eisenbahner-Esperanto-Kongress in Deutschland

## Der 64. IFEF-Kongress findet vom 19. bis 26. Mai 2011 in Herzberg der Esperanto-Stadt

statt.

Die Vorbereitungen hierzu laufen bereits. Das vorläufige Programm sieht einmal die üblichen Punkte wie den Kennenlernabend, die Eröffnungsfeier und die Schlussfeier vor. Der kulturelle Teil umfasst einen Nationalen Abend, einen Tanzabend, ein Konzert und einen Vortrag über den Harz. Den fachlichen Teil bestreitet die „termin-ara komisiono". Der touristische Teil bietet eine Stadtführung in Herzberg, einen Ausflug mit dem Zug nach Göttingen, einen ganztägigen Ausflug mit Zug und Bus nach Nordhausen/Wernigerode und einen Busausflug nach Goslar an. Daneben werden auch die organisatorischen Dinge von IFEF geregelt.

Ein Nachkongress findet in Berlin statt

Bitte merken Sie diesen Termin vor und halten ihn für Ihre Teilnahme frei.

# El fervoja mondo

Germanio **Munkeno deziras pluan urbfervojan linion *S-Bahn***

Ekde aŭgusto 2003 en Munkeno okazas preparlaboroj por konstrui spinohavan traceon de la urba fervojo *S-Bahn*. La nove aperanta linio kunligos okcidentan kaj orientan partojn de la bavaria ĉefurbo helpe de du unutrakaj tuneloj proksimume 14 km longaj. En okcidento la linio komenciĝos en kvartalo *Laim,* kaj ĝi finiĝos en oriento proksime de la orienta stacio *(Ostbahnhof)*. Tiumaniere oni malŝarĝos la nuntempan liniosekcion, servantan kiel kunligo de la ĉefa kaj orienta stacioj.

Svisio. **Dua trako en tunelo *Lötschberg***

Apud svisa baza tunelo *Lötschberg,* kiu estas en du trionoj unutraka, ekzistas el teknika vidpunkto eblo finkonstrui la duan trakon sur la restanta traksekcio. Konstruado povus okazi dum la ekspluatado, sed financaj elspezoj estos videble tro altaj. Finkonstruado de la dua trako daŭrus dekdu jarojn, oni supozas suman elspezon 790 milionoj ĝis 1,3 miliardoj da svisaj frankoj. Esperoj por reala konstruado tamen ankoraŭ ne estas realaj.

Nederlando ***Hupac* plimultigas oferton en Antverpeno**

Kombina operatoro de *Hupac International* ofertas pluan kunligon el la nova terminalo *Combinant* en Antverpeno. La nove enkondukota kaj kvarfoje en semajno trafikanta trajno el antverpena *Combinant* al germana *Ludwigshafen* havos de tie ĉi kunligon al terminalo *Hupac* en itala *Busto Arsizio,* kiel ankaŭ al la kombin-terminalo *Schkopau.* Trakcion al *Ludwigshafen* plenumas *Crossrail, SBB Cargo* poste al *Busto* kaj *rail4chem* al *Schkopau* (Saksio-Anhaltio ĉe la rivero *Saale*).

Pollando **Koakso por *Krupp* estos transportata sur fervojo**

Germana ŝtata kompanio *Thyssen Krupp Min-Energy* faris kontrakton kun pola koaksejo sudorienta de *Wrocław*. Estonte oni transportos jare 70 mil tunojn da koakso el malsupra Silezio al germana *Duisburg* (Nordrejno–Vestfalio). Krudaĵon oni enkargados en speciajn konteneroj kaj transportos per navedvagonaraj trajnoj. Fervoja varianto por tiu ĉi kategorio estas pli favora ol transporto surŝosea, estas bezonataj malpli da transkargadoj.

Aŭstrio **Oni pripensas trafikĉesigon al *Brenner***

*ÖBB* pripensas plenan trafikĉesigon de la fervoja linio *Innsbruck – Brenner* en somero 2012. Kialo estas necesegaj sanigaj laboroj: Ekzistas ankaŭ varianto pri trafikĉesigo de nur unu trako. En tiu ĉi kazo konstruaj laboroj komenciĝos jam en la jaro 2011. Dum kvin jaroj oni trafikĉesigu unu trakon ĉiun fojon dum du monatoj. Tamen ankaŭ en tiu ĉi solvo oni bezonus plene ĉesigi la trafikon dum du semajnoj: en la jaroj 2011 kaj 2015. La sanigo inkluzivas interŝanĝojn de la trakoj, renovigon de du tuneloj, de la 23 fervojaj pontoj kaj konstruon de nova ponto. La fervoja linio estas tre veturuzata

Kompiliis Jindřich Tomíšek - Reviziis Heinz Hoffmann

# Fervojo investas en la *Duisburg*-haveno



Kohleninsel

Pro la antaŭvidebla fino de la germana ŝtonkarbo, la bezono de importenda karbo altiĝos ĝis 2018 rond-sume je 11 milionoj da tunoj jare. Tial la Germana Fervojo Akcio-Societo (*Deutsche Bahn AG)* investos ĝis en la jaro 2014 rondsume 19 milionojn € por plivastigi kaj modernigi la transkarg- kaj depon-kapaciton sur la karboinsulo (*Kohleninsel)* en la *Duisburg*-haveno. Tion antaŭvidas aktuala estrardecido de *„DB Mobility Logistics AG"* (germana societo *DB/Schenker*), kiel publikigis la entrepreno en Berlino. Tiu, portranskargado de import-ŝutaĵo strategie favore situanta insulo, disponas nuntempe kapaciton de 2,5 milionoj da tunoj jare. Ĝis fino de la jaro 2014 oni intencas plimultigi la kapaciton al 4,5 milionoj da tunoj. Ĝis tiam duobliĝos la kapacito de importo per riverŝipoj el *Rotterdam***.** Samtempe ankaŭ duobliĝos la transkargado, stokado kaj la livero de karbo al elektraj centraloj.



Kohleninsel

Trovita en WAZ ; fotoj el Wikipedia

Wenn Sie uns eine Spende zukommen lassen wollen, hier unser Konto:
Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
Konto 953 729 bei der Sparda-Bank Hessen, BLZ 500 905 00




In 32 Minuten fährt man mit dem Zug von Zittau nach Liberec. Auf der Straße sind es kaum mehr als 20 Kilometer. Sozusagen vor unserer Haustür findet in Liberec vom

**7. bis 14. Mai 2011 der IFEF-Kongress**

statt. Also auf nach Liberec!

## Nessiteras skeptyx

Tiu stranga nocio kaptis mian intereson dum foliumo de scienca ĵurnalo. Laŭ la teksto mi ne povis diveni, pri kio temas. Meditante, mi disigis la vorton al "nessi" kaj "tera" kaj "skepty". Tera povas esti lando. Nessi? Nia filino ludis per stranga pupanimalo nomita nessi. Tia animalo vivis en skotlanda maro. Aldone: skepty povas signifi skeptika.

Mi demandis interrete Google kaj spertis, ke la usona fantomĉasisto kaj fisikisto Robert Rine (kiu en decembro 2009 mortis), okupiĝis science per la fantomo kaj donis al ĝi tiun nomon. Li skribis vastan artikolon kun interesaj bildoj en la scienca jurnalo, kiun mi hazarde trovis. Li supozas, ke la giganta animalo Nessi sendube fariĝis viktimo de la tutmonda varmiĝo. La Nessi de nia filino ankaŭ ne plu ekzistas, sendube el aliaj kaŭzoj.

Dieter Hartig

## Per sensora tekniko rigardi tra muroj.

Usonana inĝeniero Neal Patwari realigis la sonĝon de ciuj spionoj: Rigardi tra muroj. Tio funkcias per radioantena sistemo. Oni povas ekkoni movon de homoj en apudaj ĉambroj.

Radioondoj ja povas trapenetri murojn, sed la homajn korpojn ili absorbas. Tiu fenomeno instigis Patwari eksperimeti. Li esploras plurajn jarojn per sia ideo kaj sukcesis. Nun eblas konstati precize la posicion de homo en apuda ĉambro.

La armeo jam montris intereson al tiu elrovo. Ankaŭ la fajrobrigado intencas, tiamaniere serĉi forrestitajn personojn.

Dieter Hartig

## Energio el strattruoj

Tiu ideo naskiĝis, kiam usonanaj studentoj de inĝenierstudejo saltis sur siaj litoj.

El tio ekestis genia ideo: La puŝamortiziloj de aŭtomobiloj veturantaj trans strattruoj ekstermas multe da energio. La ideo de la studentoj estis, eluzi tiun energion.

Ili konstruis puŝamortizilon, kiu transformas la puŝenergion en elektrikan energion kaj nutras per tio la baterion.

Ĉiu puŝo premas fluaĵon tra turbino, kiu funkcias kiel generatoro. Tio estas plej efika ĉe pezaj aŭtoj, ekzemple ŝarĝaŭtoj.

Intertempe la studentoj fondis fabrikon kaj agas kun bona sukceso.

Tion trovis Dieter Hartig en presaĵo „Fahrzeugtechnik"

## Charles Darwin

(vivis de 1809 ĝis 1882) meditis pri la demado, kio aperis unue, la kokino aŭ la ovo. Tiu temo okupis sciencistojn jam ek de la antikva epoko. Ekzemple la fama Plutarch (45 ĝis 125 en nia erao) skribe traktis tiun evidente gravan temon.

**Kio aperis unue, la ovo aŭ la kokino??**

La usonana esploranto Stuart Kauffmann asertis, ke nek la ovo, nek la kokino unue aperis. Ambaŭ evoluiĝis kadre de evolucia teorio – kiel la vivo entute evoluiĝis.

Kaufmann asertis, ke sufiĉas miksi molekulsupon – kaj vivo ekstaras kvazaŭ memstare.

Kiu pretas eksperimente esplori tion kun Dieter Hartig?

Wir trauern um

**Wilfried Mester**

aus Erkelenz

*27.3.1925 †30.1.2011

Viele Jahre war er unser treues Mitglied und ein Streiter für unsere Idee




## KALENDER

25.-27.3.2011
Esperanto-Kurs
der Esperanto-Jugend in Berlin
http://esperanto.de/ej.berlin//cms/

22.-29.4.2011
27. Internatonale Frühlingswoche
im Pfälzer Wald
psi@esperanto.de

1.-3.10.2011
Jahresversammlung unserer Vereinigung im Seebad Ahlbeck
Programm und Anmeldeformular sind dieser Ausgabe des Fervoja Esperantisto beigefügt.
Eine Verlängerung des Hotelaufenthalts in Ahlbeck ab 3.10. ist nicht möglich.
Buchung für einige Tage vor dem 1.10. auf Anfrage möglich. Tel. (038378) 570



Redaktfino por FE 2/2011 estos la 15.05.2011
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel. (06 61) 7 76 27, Fax (06 61) 3 02 96 92, E-Mail: fritzlautenbach@gmx.de

# ESPERANTO - FERNKURSE

## I

### ESPERANTO – EINE LEBENDIGE SPRACHE

### EINFÜHRUNGSKURS

Sie erhalten:
- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 7 Lehrbriefe
- Korrekturen
- Beratung

Sie steigen mit normalen Sätzen aus dem Alltag unmittelbar in die Sprache ein.

KOSTEN: 16 €

## II

### FORTBILDUNGSKURS

### KONVERSACIA KURSO

Viele Situationen des täglichen Lebens werden als Gesprächsstoff behandelt

Sie erhalten:
- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 15 Lehrbriefe
- briefliche Betreuung
- Korrekturen
- Beratung

KOSTEN: 21 €

**- leicht und bequem daheim lernen -**

MIT DIESEN LEHRGÄNGEN WERDEN SIE FLÜSSIG SPRECHEN

ESPERANTO FLÜSSIG SPRECHEN ZU KÖNNEN; IST EIN ERLEBNIS
GÖNNEN SIE SICH DIESEN ERFOLG!
Bestellen Sie bei: Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
Karl Bernhard, Sauerbruchstr. 8, 67063 Ludwigshafen
Lieferung nach Zahlungseingang auf:
Konto 953 729 bei Sparda-Bank Hessen, BLZ 500 905 00